



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 31/1973 4 dec 1973
Aperas ĉiusemajne

15a decembro

Tago de la

Esperanto-Libro

Mendu minimume
1 libron ĉe
Ludwig Pickel

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

25 jarojn - Homaj Rajtoj

Nürnberg (pp) Antaŭ 25 jaroj, la 10an de decembro 1948, estis akceptita la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Pri la ĝenerala signifo de tiu dato skribis prof. d-ro Ivo Lapenna en artikolo kun la titolo "Lingvaj rajtoj kaj lingva diskriminacio" (revuo "esperanto, oktobro 1973). Ankaŭ en la naciaj amasmedioj oni multe parolas kaj skribas pri tiu datreveno kaj pri la **fakto**, ke preskaŭ ne ekzistas ŝtato, en kiu rigore oni observas kaj sekvas la Universalan Deklaracion, sed pri la lingva aspekto oni preskaŭ ne parolas.

Ankaŭ Esperanto estas homa rajto, kiu devus stari sub la protekto de la Universala Deklaracio kaj esti konfidata al la gardo de la publiko. Sed bedaŭrinde la pretendo de naciaj lingvoj kaj malprudento, malico kaj antaŭjuĝo subpremas tiun rajton. Oni atakas - rekte aŭ malrekte - kaj misfamigas Esperanton, oni mokas pri ĝi kaj malhelpas ĝian lernadon kaj uzadon. Kaj multaj esperantistoj timas identigi sin en la publiko kun Esperanto - pro perdo de reputacio aŭ pro sufero de materiaj malavantaĝoj.

Esperanto baziĝas sur internacia kunlaboro kaj libera fluo de personoj, pensoj, ideoj kaj informoj trans ĉiujn limojn laŭ artikolo 19 de la Universala Deklaracio. Sed tiu rajto ne estas observata kaj aplikata en ĉiuj landoj kaj organizaĵoj. Se Esperanto-revuoj pro ideologiaj motivoj principe rifuzas aperigi informojn pri Esperanto-aranĝoj kaj agadoj en certa parto de la mondo, tio malhelpas al la koncernaj esperantistoj havigi al si informojn. Se krom tio ŝtataj instancoj rigore malpermesas la enlasadon de Esperanto-presaĵoj kaj speciale de Esperanto-revuoj kaj konfiskas ilin, tio ankoraŭ pli akre malhelpas la realigon de tiu homa rajto.

LOT ankaŭ estonte en Esperanto

Varsovio (pp/PFA) La 16an de novembro en la kinejo de la Junulara Palaco en Varsovio okazis projekciado de 2 esperantlingvaj filmoj de FIAT ligita kun diskuto pri utiligo de Esperanto por reklamado. Post la prezentado de la filmoj ni eksciis, ke la Polaj Aer-Linioj LOT plue intencas utiligi Esperanton por informaj-reklamaj celoj. Ni ankaŭ eksciis, ke estas nun preparata nova esperantlingva bulteno de LOT kaj kolora faldfolio. Eluzante la okazon valoras aldoni, ke la du unuaj bultenoj de LOT en Esperanto estas senpage haveblaj ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Varsovio, Box 46, Pollando.

Nuda inter lupoj baldaŭ en Esperanto

Leipzig. En la eldonejo Edition Leipzig (GDR-701 Leipzig, Poŝtkesto 340) baldaŭ aperos la Esperanto-versio de la romano "Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz. Formato 12 x 19 cm, tuttole bindita, ĉ. 500 paĝoj, prezo 12 GM. Antaŭmendojn akceptas Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg.

Alproksimiĝas la jarfino! Ĉu vi jam aliĝis al la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo 1974 profitante la rabatitan kongreskotizon! Post la 31.12.73 plialtiĝos la kongreskotizo! Petu aliĝilon kaj 1an Bultenon de Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113!

Esperanto en radio

Pekino. La Esperanto-sekcio de Radio Pekino dissendis al siaj aŭskultantoj jenan informilon: "Kara amiko: Baldaŭ alvenos la jaro 1974, ni elkore adresas al vi kaj viaj familianoj intiman saluton kaj bondeziron. Ni sendas al vi 1974-jaran kalendaron, bonvolu ĝin akcepti por memoro. Kara amiko, ni varme bonvenigas vin daŭre aŭskulti la elsendon de nia radio en la nova jaro. Senĉese disvolviĝu la amikeco inter ni, tra korespondado. Novjaran bondeziron Esperanto-sekcio de Radio Pekino."

Romo. Romo nun elsendas - dimanĉe inter la 21a kaj 21,20 h - sur jenaj ondoj: 30,90 - 41,24 - 50,08 m resp. 9 710 - 7 275 - 5990 kilohercoj. Redaktoro de la elsendoj estas doktoro Antonio DE SALVO, via olbia 15, I-00182 ROMA, kunlaboras f-ino Mirella Merlani kaj d-ino Vera di Tocco. Bedaŭrinde la lastdimanĉa elsendo ne estis kaptebla ĉi tie.

Berno. D-ro A. Baur prelegis pri "Lingvoj en Svislando" komentante la raporton de Tzaut Olivier dum la Dua Generala Kunveno en Beogrado, laŭ kiu pro enmigrado de gastlaboristoj la lingva strukuro de Svislando. D-ro Baur opiniis, ke gastlaboristoj ne enfluas la proporcion de la lingvoj, ĉar ili devas lerni la lingvon de sia laborloko.

Varsovio. En Pollando oni ankaŭ parolas pri nafto kaj la nafta krizo laŭ la marda felietono "Pri kio oni parolas en Pollando". Sed la ekonomio de Pollando ĉefe baziĝas je karbo kaj la patronino de la ministoj, Sankta Barbara. Sed oni ankaŭ parolas pri Vjetnamo, de kie restadis dum ĉi tiuj tagoj delegacio en Pollando. La dimanĉa Esperanto-Ekspresso aŭdigis intervjuon kun la konata hungara esperantisto d-ro István Szerdahelyi pri liaj prelegoj kaj restadoj en kelkaj polaj urboj. La pli ampleksa ekspreso lunda alportis pliajn du intervjuojn kun s-roj Stilsfer kaj Simonet. La provizo de intervjuoj, kiujn A. Pettyn faris en Beogrado, ŝajnas esti ne elĉerpeblaj. Certe tiuj intervjuoj estas interesaj, sed restas la demando, ĉu la "Esperanto-Ekspresso" plenumas la taskon aŭ promeson de sia propra titolo, nome doni buntan kalejdoskopon de la Esperanto-movado, de okazaĵoj, eventoj, iniciatoj kaj tendencoj. Tiun demandon mi ne unuavice direktas al la Esperanto-redakcio, sed al la respondeculoj de la Esperanto-movado, al UEA, al la landaj kaj fakaj asocioj, lokaj grupoj ktp. Ĉu vere ne ie ajn okazas io grava, kiu valoras sciigi al la Esperanto-redakcioj? Ĉu speciale la landaj asocioj ne komprenas la ŝancon rapide kaj aktuale raporti pri siaj laboroj, intencoj kaj planoj?

Pri radio-elsendoj en Esperanto

Radio-stacioj dissendas en Esperanto ne pro ia "amo al la lingvo", sed ĉar Esperanto estas konsiderata - prave - samnivela kaj samrajta esprimilo kiel aliaj lingvoj... Esperanto, kiel ĉiu lingvo estas esprimo de pensoj, kaj tia oni devas ĝin konsideri, minimume, kiam oni direktas sin al ne-esperantistaj homoj aŭ instancoj. Por flankenmeti la ĝisnunan metaforon, kaj prezenti konkretan aplikon de ĉi tiu starpunkto, ni diru, ke kiam esperantistoj pledas por enkonduko aŭ plua uzado de la internacia lingvo, ili neniam forgesu, ke la ekstera mondo ne multe interesiĝas pri reciproka amo, sed multe pri diskonigo de propraj kvalitoj kaj atingoj. Estas tute sensece proponi al neesperantista instanco la disvastigon de la esperanta idealo; sed bonajn rezultojn oni povas akiri, se oni lerte prezentas la eblecojn atingi, pere de la internacia lingvo, pli vastan nombron de potencialaj interesitoj pri la aferoj de la koncerna instanco.... Unua devo de ĉiu konscia esperantisto, do, estas pruvi al la radioinstancoj, ke la esperantoprogramoj estas, por tiel diri, "bona negoco", kaj valoras la peno ilin daŭrigi kaj laŭeble pliampleksigi... (Kuriero de Esperanto, ROMO)

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Dr. Rommel, departementestro en la federacia ministerio pri klerigo kaj scienco en Bonn, estas la kompetenta referento por Esperanto en tiu ministerio. Prilaboranto de kurantaj Esperanto-aferoj en la sama ministerio estas Oberamtsrat Leibl.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĵus en novembro estis distingita per plia universitata titolo de profesoro pri kompara juro (soveta kaj orienteŭropa) en la Universitato de Londono.

Prof. D-ro Helmut Ebinger, Reinbek, katedra profesoro en la Universitato de Hamburgo, estas la rektoro de la 27a sesio de la Internacia Somera Universitato, kiu okazos en la kadro de la 59a Universala Kongreso de Esperanto 1974 en Hamburgo.

Ludwig Schödl el GDR, d-ro István Szerdahelyi el Hungario kaj N.B. Aleksiev el Bulgario dum ĉi tiuj tagoj faris aŭ faras prelegvojaĝon tra Pollando laŭ invito de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun la kulturcentroj de la koncernaj landoj.

Uwe Joachim Moritz, FRG, estas la aŭtoro de katalunlingva artikolo pri Esperanto en la gazeto TERRES CATALANES n-ro 11, kiu aperas en Francio.

Ulrich Brandenburg, Helmut Klünder, d-ro Rudolf Fischer, Gisela Jungkamp kaj Guido Brandenburg, ĉiuj el Münster, apartenas al la LKK de la 30a Internacia Junulara Konferenco 1974. Post sukcesa partopreno en intensa Esperanto-kurso en Gronau aldoniĝis Nani Lam, indonezia studentino en Münster.

Citaĵoj el POLA ESPERANTISTO n-ro 3/1973

Felietono "La Donna è mobile Alie virino kun barbo" en la serio Hirtaj pensoj de Jerzy Grum.

Jerzy Grum pri la poloj: "Poloj estas la lasta nacio, kiu blinde akceptas la desupraĵn verojn. Oni devas konvinki nin, akiri nian konfidon, por ricevi de ni la mandaton de aprobo. Skemeco de la penso estas al ni fremda."

Jerzy Grum pri si mem: "Mi ne estas soldulo aŭ dungito, sed laboranto de la Pola Radio, membro de la Asocio de la Polaj Ĵurnalistoj. Ĉu estas io malĝusta en tio, ke mi laboras en la Pola Radio? Aŭ ĉu eble Dermot J.F. Quirke opinias, ke en la Pola Radio prefere devus labori turkoj, japanoj aŭ...skotoj?"

Noto: Jerzy Grum estas redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Dermot J.F. Quirke estas la aŭtoro de felietonoj en la rubriko "Aliflanke...de "The British Esperantist".

Radio Bervalio respondas

D: Ĉu povas esti virino kun barbo?

R: Jes povas esti tia inter la..skotoj!

D: Kial Pekino favoras la reunuigon de Germanujo?

R: Ĉar ne povas esti du Ĉinioj.

D: Ĉu povas esti Esperanto-"Spegulo"?

R: Povas esti, sed nur tiam, kiam ankaŭ la lasta esperantisto kuraĝas rigardi la spegulan vizaĝon de Esperanto!

POLSKIE RADIO - WARSZAWA

Nova Konkurso de la POLA RADIO

- 10-tagaj ekskursoj tra Pollando,
- multaj premioj kaj objektaj memordonacoj

en konkurso de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj okaze de la Jartrideko de Popola Pollando.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la subaj demandoj:

- 1) *Kiujn atingaĵojn de Pollando (sociajn, ekonomiajn, kulturajn ktp.) en la periodo de la 30 lastaj jaroj vi opinias la plej interesaj?*
- 2) *Pri kio karakteriza: nomo, evento, fenomeno, objekto ktp. - vi ekpensas lige kun Pollando?*
- 3) *Kiujn establejojn projektitajn aŭ konstruitajn de poloj en via lando aŭ en la mondo vi konas?*

La respondojn ni petas sendi laŭ adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa 1, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso” ĝis la 31-a de decembro 1973 (decidas la dato de la poŝta stampo).

. . .

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la disaŭdigoj emisiotaj la 31-an de januaro 1974.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

POLSKIE RADIO